



Unum ovile et unus pastor.  
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanta.  
(Joh., X, 16)

# ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO

Oficiala organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista  
(I. K. U. E.) de P<sup>RO</sup> Richardson.

## Ankoraŭfoje pri la unueca tekstado de la ĉefaj katolikaj preĝoj.

Nia oficiala organo EK — la dunumero  $\frac{8}{9}$  de Aŭgusto-Septembro 1920 sur la paĝo 199 — publikigis la laŭkongresan unuecan tekston de niaj ĉefaj katolikaj preĝoj. Ĉi tiu laŭkongresa tekstaĵo ĝisnun miascie ankoraŭ ne ricevis eklezian aprobon, tiel ke ĝi ankoraŭ ĉiam eltenas postan kaj suplementan diskutadon. Sed pro tio mi ne volas esti kritikemulo pri la tiama altŝatata kongres-, resp. tradukkomisio. Ne, tute ne; mi nur volas amike babili kaj prezenti kelkajn aforismajn pensojn, kiuj min gvidas ĉe la traduko de kat.-teologiaj fakesprimoj (1).

Sur la paĝo 188 de la nomita EK-kajero estas cititaj ankaŭ la „vidpunktoj“, laŭ kiuj la tradukkomisio elektis la tekstojn. La „vidpunktoj“ estas jenaj: „Oni uzis kiom eble *nur Fundamentajn vortojn*, do ankaŭ *Jesuo kaj Mario*. *Esceptojn* oni devis fari pri la vortoj „graco“ kaj „konceptiita“, kiuj estas *nepre necesaj*, ne anstataŭeblaj per Fundamentaj vortoj.

Oni sekvis la *Latinlingvan tekston* kiom eble *laŭvorte*, ne nur laŭsence, lasante ekz. la adjektivojn kaj la pronomojn post la substantivoj, uzante „ĉielo“ kaj en alia loko „ĉieloj“, ktp.

„Kredo“ kompreneble postulis la plej longan pridiskutadon kaj en la komisionaj kaj en la decidantaj kunsidoj. Oni elektis la formon „je“ por la Latinlingva „in“, speciale, por eviti amason da akuzativoj alie necesaj.“ —

Ĉu ĉi tiuj „vidpunktoj“ estas solidaj?

La latinlingvan tekston la komisiono ŝajne ne ĉiam severe observadis. Ĝi tradukis la latinlingvan katolikan saluton „Laudetur Jesus Christus. In aeternum. Amen,“ per: „Laŭdata estu Jesuo-Kristo. En eternecon. Amen.“ Kial ne „En eternon“ anstataŭ „En eternecon“? Ankaŭ la vorto „eterno“ enhavas daŭradon sen komenco kaj fino. Kaj latinlingve la esprimo ja ne laŭvortas „In aeternitatem“, sed „In aeternum“.

Krom tio oni tradukis en „Kredo“ la latinan esprimon „Filius unicus“ per „lia unusola Filo“ anstataŭ per „Lia unika Filo“. La latina teksto ne laŭvortas „Filius unicus“. La vorto „unika“ estas jam de longe akceptita, kaj la bonega vortaro de Kabe (1911) enhavas la vorton „unika“ kaj klarigas ĝin per „sola en sia speco, ne havanta alian egalan aŭ similan“, do ankaŭ ĉi tie nepre taŭga kaj eĉ la dogma vorto.

Ankaŭ la radiko „krucifiks“ jam de longe ekzistas kaj inter la tielnomitaj „Zamenhofaj vortoj“ (Kajero 8 (1908) de „Esperantista Centra Oficejo“)<sup>2</sup> kaj en „Unua oficiala aldono al Universala Vortaro“ (Kajero 13 (1909))<sup>3</sup> ĝi estas notita. Laŭ tio oni povas ankaŭ diri „krucifiksi“ anstataŭ „krucumi.“

La sanktaj nomoj „Jesuo-Kristo“ estas plenskribitaj, t.e. kun du nominativaj finoj kaj ligostreketo. Ĉi tiu dunominativa formo ne ŝajnas bonsona. En sufiĉa literaturo mi trovas nur la pli belsonan formon „Jesu-Kristo“ aŭ „Jesu Kristo“ (kun kaj sen ligostreketo), ekz. en multaj kajeroj de EK; en la bonstila libro „Kie estas la Eklezio de Kristo“<sup>4</sup>; en „Katolika Kantikareto“ de Frato Izidoro<sup>5</sup>; en „Imitado de Jesu-Kristo“<sup>6</sup>; en „Katolika Preĝaro“<sup>7</sup>; en „Spirita Juvelaro“<sup>8</sup>; eĉ en la Idista(!) verketo „Katekismo por l' infanti“<sup>9</sup>. Ĉu ni ne devas ankaŭ decidiĝi, akcepti la saman pli bonsonan esprimon „Jesu-Kristo“ kiel unuecan tekston, kiun jam akceptis pluraj aliaj aŭtoroj? Rajte D<sup>ro</sup> Zamenhof mem (Oficiala Gazeto“, III 1911 p. 293) skribas: „Ĉiufoje, kiam la logiko ne donas al ni respondon tute klaran kaj senduban, kiu ne ofendus nian lingvan senton, ni devas peni konformigi nin al la ekzistantaj kutimoj“.

Strangmaniere „oni elektis la formon „je“ por la Latinlingva „in“ speciale, por eviti amason da akuzativoj alie necesaj“. Ĉi tiu gramatika aŭ stila argumento estas lingva eraro. D<sup>ro</sup> Zamenhof diris en § 28 de sia Fundamento-Ekzercaro<sup>10</sup> jenon „Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la moninativon. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de iliaj kaŭzoj.“ Laŭ tio tute ne estas do necese, ĉi tie uzi la akuzativojn, ĉar oni povas korekte diri „Mi kredas en Dio, la Patro ĉiopova“... kiel same ankaŭ la supre cititaj verkistoj esperantigis. Jam do ekzistas certa interkonsento,

kaj oni povas denove citi Zamenhofan frazon: „Ĉar la tuta esenco de lingvo estas bazita antaŭ ĉio sur *interkonsento*, tial komuna ĝisnuna uzado devas ludi en lingvo pli gravan rolon, ol seke teoria logikeco“ („Oficiala Gazeto,” III 1911 p. 291).

Ankaŭ estas diskuteble, ĉu ne estus estinta pli bone, krei aŭ pli vere konservi la dogmajn vortojn „descendis“ kaj „ascendis“ anstataŭ „malsupreniris“ kaj „supreniris“ Ĉu ĉi tiu mia opinio ne transpaŝas la limojn? Bonvolu min aŭskulti. Antaŭ mi kuŝas du broŝuroj de „Esperantista Centra Oficejo“ titolitaj „Zamenhafaj Vortoj“<sup>2</sup> (1908) kaj „Unua oficiala adono al Universala Vortaro“ (1909)<sup>2</sup> [kun folieto da „Vortoj ĉerpitaj el Hamleto”]; ili enhavas amason da *nove akceptitaj vortoj* „netroveblaj en la Universala Vortaro” Al tio rimarkas „Klariga Noto” (kiel antaŭparolo): „Tiu listo estas unua listo. Ĝi, sekve, ne estas plena. Oni tute ne intencis doni plenajn seriojn. Iom post iom la serioj plipleniĝos.... Tiamaniere, per nerapida, sed certa irado, nia oficiala komuna vortaro ĉiam pli kaj pli riĉiĝos, ĵiaj mankoj ĉiam pli kaj pli malaperos, sen ia rompo en la uzado de nia lingvo” Nu, ĉu ni ne devas ĉi tiun metodon per analogio pretendi ankaŭ por nia eklezia lingvo? Kial do tiel ĝenece eviti ĝuste *dogmajn vortojn*? Tiamaniere ni neniam ricevus teologian terminaron. Ankaŭ ĉi tie estu nia devizo „Sentime kaj fidele!”

Pro ĉi tiu sama kaŭzo mi dirus „Ave Maria” anstataŭ „Saluton, Mario.” Kie ĉi tie ne eksentas la malsamecon? Denove mi nomas D<sup>ron</sup> Zamenhof kiel atestanton. kiu diras en sia antaŭparolo al la „Lingvaj Respondoj”: „Ni tute ne apartenas al tiuj personoj, kiuj dezirus, ke la Akademio donadu al ni kiom eble pli da decidoj. En lingvaj demandoj ĉiu superflua decido katenas, kaj ni devas esti kun ĝi tre singardaj; „decidojn” oni devas fari nur en okazoj de efektiva kaj senduba neceseco!” Do ankaŭ ni konservu al ni certan *liberecon*! Cetere, ĉu la saluto „Ave Maria” ne estas jam *internacia* esprimo, almenaŭ por la tuta katolikaro? Kaj ankaŭ en la Mariana Esperanto-poezio mi ne malofte legis la saluton „Ave Maria”; ekz. la konata kaj ŝatata Frato Izidoro surkribas sepstrofan poemon „Ave Maria” kies ĉiufoja rekantajo laŭvortas „Ave, ave, ave Maria!”, Se oni permesas en poezio diri „Ave Maria” kial ne ankaŭ en prozo?

Estas vere: iom post iom kelkiu nun alfrapanta kaj nekutima esprimo hejmiĝos, sed mi timas, ke la esprimo „Saluton, Mario” postulos longan tempon por sia hejmiĝo, supozite, ke ĝi ajn hejmiĝos Mi ne povas al mi pensi, ke ekz. en „Marianaj floraj ludoj” la la laŭvorta saluto „Ave Maria”, kiu estas tiel praa kiel la katolika Eklezio, iam malaperos el la katolika Esperantujo. Kie do staras skribite, ke Esperanto ne devas akcepti alilingvan heredaĵon? Ne venis ankoraŭ la tempo, ke ni estu tro predantaj; pli vere

ŝajnas el mi, ke estas multe pli bone, havi ian „embarason de riĉeco,” diras ie Zamenhof, ol malutili al si per ia ne suflĉe matura dekreto, elĵetante el la lingvo vortojn aŭ esprimojn, kies elĵetindeco ne estas ankoraŭ por ni certa plibonigo.

Niaj katolikaj preĝoj havas ĝuste en la *latina* lingvo firman fundamenton, ĉar ĉi tiu latina teksto estas praa por preĝoj, psalmoj, himnoj, kantikoj; ĝi estas *unuece* fiksita en la Misaloj, Brevieroj, Ritualoj, ktp., estas de Romo aprobita, do katolika kaj jam internacia, almenaŭ por la katolikaro. Pro tio ni devas klopodi, la Esperantajn tekstojn por niaj ĉefaj preĝoj kiom eble konformigi al la latinaj tekstoj. Rigardante religian terminaron ĝuste la latinlingva teksto por la tradukanto ĉiam povas kaj devas esti la modelo, tiom pli, ĉar la Esperanta lingvo — prave oftenomita „Novlatino” — enhavas amason da latinaj radikoj, tiel ke la esperantigo de latinaj tekstoj relative estas multe pli facila ol tiu de ĉiuj alilingvaj tekstoj. Ekz. mi memorigas je la esperantigo de la Silabuso („Syllabus“), kiun eĉ lerta esperantisto ne scipovos iel precize traduki, se li ne estos severe konsiderinta la latinan kiel por tiel diri dogman tekston. Pro tio ni katolikoj ne devas transdoni aŭ forlasi nian teologian vorttrezoron eble al iu neŭtrala Literatura Esperanto Asocio nek ni devas ĉi tiun kvalitigi, por ke ĝi kreu nian religian terminaron, ĉar ke ĝi rezenzas ankaŭ la profanajn terminarojn. Ne, nur kapablaj, instruitaj kaj kompetentaj teologoj mem kiel fakuloj devas krei tian terminaron aŭ vortaron kaj elpeti ties eklezian aprobon.

Tio ankaŭ valoras precipe por la esperantigo de la Sankta Skribo, antaŭ ĉio de la „Nova Testamento“, kiun multaj katolikoj jam malkvietege atendas tiom pli ke la Protestantoj jam de longe ĝin posedas.

Antaŭvideble dum la venonta kongreso estos daŭrigota la traduko de pluaj preĝoj (litanioj, vesperpsalmoj, k.t.p.), eble estos starigota speciala komisiono pri la traduko de la „Nova Testamento“ kaj pri kreo de religia terminaro aŭ vortaro. Ĉi tiu tre grava afero estas kiel eble plej serioze pritraktota dum la kongreso, ne per rapidega komuna kunsido, sed per kelkaj apartaj konsidoj inter kompetentuloj kaj specialistaj personoj. — Ĉi tiu komisiono ankaŭ povus preni sur sin la revizon aŭ reĉenzon pri la esperantigitaj preĝlibroj kaj ilin proponi aŭ rekomendi al la Eklezia Estraro por aprobo.

Ke multaj fakuloj kolektiĝu kaj kunlaboru al la realigo de niaj gravaj taskoj! Haltigu ni la elrompitan malpacon; ni ne pasigu plu la multvaloran tempon per senfrukta konflikto! Sufiĉe da vortoj estas parolitaj. Nun paceme kaj freŝanime al pozitiva laboro! Ties feliĉa solvo sendube estos ŝatinda propagando por nia kara afero.

Fine mi memorigas je la entuziasma parolado, farita en „Nia Unua” en Paris, Aŭgusto 1910, de S<sup>ro</sup> A. H. Nankivell: „Kaj ni havas la konvinkon, ke esperanto estas rimedo donata, same kiel ĉiu bona ilo, de Dio mem. por ke ni uzu ĝin al la plej granda gloro de Dio kaj al la savo de la homaj animoj.” —

*Pfakofen apud Regensburg.*

*Jos. Lintl, paroĥestro.*

(<sup>1</sup>) Pri event. rajto, ĉi tie prezenti miajn aforismojn, mi devas eble rimarki jenon. En 1913 mi akiris ĉe la librejo de Herder en Freiburg i. Br la rajton, esperantigi la eminentan preĝlibreton, kies germana titolo „Das religiöse Leben. Ein Begleitbüchlein mit Ratschlägen und Gebeten, zunächst für die gebildete Männerwelt. Von Tilman Pesch S.J.“ [„La religia vivo. Akompanlibreto kun konsiloj kaj preĝoj antaŭ ĉio por la klera viraro. Verkis Tilmann Pesch S.J. (592 paĝa, 7 12 cm, sur plej maldika papero)] La libreto — jam en pluraj naciaj lingvoj tradukita — enhavas tri partojn: 1a. traktas pri religia instruo, kiun per filozofaj, teolog. - apologiaj klarigoj respondas al ĉiuj laŭtempaj religiaj demandoj; 2a elmontras la diversajn praktikajn uzadojn kaj ekzercadojn de la religio; 3a alportas garnituron da plej ĉefaj religiaj eraroj de nia tempo, nome la Silabusojn de la Papoj Pius IX kaj Pius X. La traduko de ĉi tiu preĝlibreto estas malfacila pro la manko de Esperanta filoz. - teologia terminaro. Por kiom eble korekte traduki la nomitan libreton, mi pristudadis lernolibrojn, vortarojn, komentariojn, diversajn preĝlibrojn kaj kelkajn el la tro malmultaj katolikaj verkoj, kiuj ĝis nun aperis. Ĉe tio renkontis min diversaj malsamaĵoj, kiu min instigis, skribi kelkajn aforismajn pensojn en EK.

(<sup>2</sup>) Paris, rue de Clichy 51.

(<sup>3</sup>) Verkis M. van der Hagen S.J. Tradukita el Nederlanda lingvo de Fino M. Borret. Esperanto-presejo A. N. Govers, Hago (Nederlando), 1912. (Tre instrua kaj bonstila verko)

(<sup>4</sup>) Paris, Katolika Oficejo Esperantista, Rue Béranger 10. (Dediĉita al la 5<sup>a</sup> kongreso).

(<sup>5</sup>) Tradukis Paul Deschamps, 1<sup>a</sup> libro, 104 p. Ĉe la Eldonistoj-Presistoj E. Menard kaj Kio, Rue du Hallebardier 21, Tours,

(<sup>6</sup>) Kun „Imperatur“ de M<sup>ro</sup> Renou. Eldono de Espero Katolika. Sainte-Radegonde (J. v. L.) France. 1907. (180 p.)

[7] Katolika preĝlibro el Nederlanda lingvo tradukita de P. P. Pastro. Eldono de W. H. Bontamps Venlo. (Nederlando) Kun „Imprimatur“. 1910. (292 p.)

(<sup>8</sup>) Poŝpreĝareto. Germane verkita de J. Saüren, paroĥestro en Köln-Müngersdorf. Esperantigita de Fr. P. Clemente, paroĥestro en Sincing. Kevelaer, Butzon kaj Bercker, 1913, (336 p.) (Enhavas diversajn lingvajn kaj preserarojn.)

(<sup>9</sup>) Ido-Kontoro. Rue Rochecouart 83, Paris (IX). 1914. (44 p.)

(<sup>10</sup>) Dua eldono, Paris, Libraire Hachette et Cie, Boulevard St. Germain, 79. 1907.



# La Problemo de Lingvo Tutmonda kaj Historio de Katolika Esperanto-Movado.

(Daŭrigo)

1908-1909.

Malgraŭ la kontraŭa agado de idistoj, ankaŭ la kvara Univerŝala kongreso de Esperanto okazinta en 1908-a (17-22 Aŭg.) en Dresdeno, (Germanujo) havis bonan sukceson. Protektita de l' reĝo de Saksujo, ĝi signifas rimarkindan epokón de la Esperanta movado, la epokon de oficialaj aproboj.

Krom la agadaj kunsidoj dum kiuj la lingva komitato elektis *Akademion*, gardonta kun la Lingva Komitato la fundamentajn principojn de la lingvo kaj kontrolonta ĝian evoluon, okazis 31 fakaj kunestoj. Belaj festoj, simile kiel en la aliaj kongresoj, estis aranĝitaj. Profesiaj aktoroj prezentis en la reĝa operdomo de Dresdeno la de D<sup>ro</sup> Zamenhof belverse tradukitan Goethe'an „Ifigenio en Taŭrido.“ Rerezentantoj de pli ol 30 malsamaj lingvoj aŭskultis la perfekte elparolitajn, harmoniajn kaj enhavplenajn versojn kvazaŭ ili estus verkitaj en ilia gepatra lingvo. La *mond-literaturo* revita de Goethe efektiviĝis jam de longe per Esperanto; nun efektiviĝis la *mondteatro*, (55).

Kiel dum la lastaj jaroj, la Dimanĉa tago estis dedeĉita al la solenaj Diservoj, kaj la gekongresanoj ĉeestis tre multnombraj en la diversaj preĝejoj.

La katolika Diservo okazis en la preĝejo de la Sankta Koro de Jesuo. P<sup>ro</sup> *Richardson* oferis la s. meson, dum kiu belegaj kantoj kaj ĥoroj estis kantataj (ekz. „La honoro de Dio el la naturo“ de Beethoven, „Dormanta Jesuknabo“ de Hugo Wolf ktp.) Post la meso kanoniko *Pichot*, paroĥestro de s. Devoto en Monako faris altan predikon. Lia Papa Moŝto sendis sian patran benon.

Kontentigitaj la katolikaj esperantistoj forlasis Dresdenon. Komencis nova fervora agado. Ĉiu ekvidis la neceson de pli energia laboro por la fina sukceso.

\* \* \*

La malsana ĉefo de katolikaj esperantistoj, sentante la alproksimiĝantan morton, rapidis organizi la redakcian komitaton de E.K. kaj transdonis al ĝi sian revuon. Nova komitato resumis la celon de tiu ĉi revuo per tri vortoj: „Espero Katolika estos gazeto 1e *katolika*; 2e *esperantista*, 3e *agada*.“ Kaj plenumante tiun promeson ĝi tuj anoncis la daton de la kvina Univerŝala Espe-

(55) R. de *Ladevéze*, Demandaro, paĝ. 30.

peranto-kongreso en *Barcelono* kaj komencis igadi la katolikojn mulnombre partopreni en ĝi. Bedaŭrinde en la komenco de la jaro 1909-a mortis pastro Peltier.

Jam de du jaroj li suferis pro stomoka malsano. Timante la malvarmecon li foriris al Pau' kaj post tri monatoj li deziris, ke oni alkonduku lin ĝis Lourdes, kie li deziris ricevi resaniĝon de la Sankta Virgulino aŭ morti apud tiu Sanktega Patrino, Tiu lasta religia deziro estis nur efektivita laŭ la Dia volo.

En Julio de la 1908-a li ankoraŭ ĉeestis la solenajn jubileajn festojn (de la 14-a ĝis la 16-a), sed li ne povis plene ĝui ilin. Li revenis el Lourdis ne resanigita. „La Dia providenco“, li skribis, „elektas mem la tagon kaj la horon por sia bonfaremo, kaj ni devas submetiĝi al lia senerara saĝeco. Tamen... mi konservas la esperon, ke dum la alia pilgrimo, la Sankta Dipatrino min plene resanigos.“ La saĝeco de Dia providenco alie decidis; P<sup>ro</sup> Peltier mortis en Lourdes apud la Sanktega Virgulino la 17-an de Februaro 1909a, Ĝis la lasto horo li konservis sian tutan submetiĝon al la volo de Dio, kaj ripetis; „Mia Dio, mi prezentas al Vi mian vivon por Franclando, por mia revuo „Espero Katolika“, por tiuj, kiuj preĝis aŭ preĝos por mia animo“.

La daŭrado de la komencita laboro, fideleco al lia revuo, por ke efektiviĝu la unueco de la kristanoj per tiu genia rimedo „la Esperanta lingvo“: tio estis lia arda, lia lasta deziro.

Nun la fondinto de „Espero Katolika“ ripozas en la urba tombego de Lourdes. Sur lian modestan kaj decan tombon oni starigis ŝtontabulon el blanka marmoro kun tiu ĉi simpla gravurita surskribo: „Abbé Emile Peltier“ kaj la dato de lia morto, Nenio plua. Sed la Esperantistaj katolikoj ne bezonas alion por ĉiam memori kaj honori la kuraĝan batalinton, kies revo de „Katolika Unuiĝo Esperantista“ baldaŭ post lia morto efektiviĝis.

La lokon forlasitan de pastro Peltier rapidis okupi novaj junaj fortoj, inter kiuj precipe memorinda estas *Cl. Colas*. Li ne sole lerte daŭradis la redaktadon de „Espero Katolika“, sed fondis eĉ novan „Katolikan organizacion“ sub la nomo „Katolika Esperantista Oficejo.“ La plej energie li agadis por altiri pli multe da katolikaj esperantistoj al la kvina unuversala Esperanto-kongreso. Malgraŭ malfavoraj politikaj cirkonstancoj ankaŭ tiu kongreso kiŭ okazis en Barcelono de la 5-a ĝis la 11-a de Septembro 1909-a sukcesis kaj la katolika grupo de esperantistoj aperis nemalgranda. Dekfoje dum tiu kongreso la katolikoj kunvenis, ĉu por studadi kune la estontan programon kaj esplori la sekvotan vojon, ĉu por suprenaltigi al Dio en komuna lingvo la preĝojn de la koroj jam unuigitaj per la sama kredo kaj sama espero. Hispana P<sup>ro</sup> *Marko Lliró* el la ordeno de l' Piaristoj, P<sup>ro</sup> *Patrick Parker*, Irlandano, kaj P<sup>ro</sup> *Tacker* diris la solenajn mesojn en la preĝejo

de la *Casa de la Caridad* kaj ĉe Nia Sinjorino de Merced. *Pro Richardson* kaj *Pro Bazilio*, kapuceno, kaj *Pro Sacher* predikis. Belaj kantoj plibeligis la Diservojn kaj naskigis profunde religian sentadon, kiu faris en la koro de ĉiuj ĉeestantoj, al kiuj Lia Papa Moŝto sendis la Apostolan Benon, plej dolĉan impreson. Post la mesoj en la korto de la Casa de la Caridad kelkaj centoj da geinfanoj edukitaj de la filinoj de S. Vincento de Paŭlo faris plej elegante ĉarmajn infanajn rondodancojn kaj kantis diversajn kantojn. (56).

El la decidoj de Baelona kunveno la plej grava estis la jesa solvo de la demando pri la utilo kaj neceso kunvoki en Parizo dum la printempo de 1910a la unuan kongreson de katolikaj esperantistoj kaj organizi ne nur vorte, sed efektive la tutmondan societon de katolikaj esperantistoj, al kiu oni donis la nomon: „Katolika Unuiĝo Esperantista“ (K.U.E.) La 9<sup>an</sup> de Septembro 1909<sup>a</sup> tiu societo estis fondita. *Pro Marko Lliro* skribis la regularon kaj *Pro Richardson* estis elektita la unua ĝenerala prezidanto de K.U.E.

Ĝisnun en neniu alia kongreso pli utila laboro estis farita por la esperantista afero. „Diri, ke tiu kongreso estis sukceso por la katolikaj Esperantistoj ne sufiĉas; ĝi estis *triumfo*.”

Kvar tagojn post la fermo de la 5<sup>a</sup> kongreso, la 15<sup>an</sup> de Septembro, pro la oktavo festa de la S<sup>ta</sup> Virgulino la grandega preĝejo de la historie fama abatejo, starigita preskaŭ mirakle inter la krutaj rokegoj de *Mont Serrat* estis tutplena de fideluloj. Dum la Sankta meso predikis en Esperanto *Pro Marko Lliro*. Je la fino de la prediko *Pro A. Richardson* solene benis la *Standardon de K.U.E.* Post la meso *S<sup>ro</sup> Claudius Colas*, la ĉefredaktoro de „E.K.” prenis la benitan flagon per sia mano, kaj sekvita de la aro de fideluloj, li marŝis ĝis la kortego de la abatejo. Tie li haltis, donis la standardon al *Pro Richardson* kaj komencis paroladon, el kiu ni eltiras nur jenajn frazojn: „En la tempo, kiam provincoj batalis kontraŭ provincoj, ekzistis homoj, kiuj super provincaj disputoj starigis pacan signon, ili predikis al la interbatalantoj la unuiĝon ĉirkaŭ nova signo, kiu estis la simbolo de pli granda amo: la standardo nacia, simbolo de la amo patruja.

Hodiaŭ homoj ankaŭ leviĝas, kiuj flirtigas super interpopolaj malkonsentoj novan standardon, simbolon de pli granda amo. Tiuj homoj estas Esperantistoj, tiu nova signo estis la *verda standardo*“.

Klarigante la sencon de tiu standardo li montris ke la ideo de

---

(56) Krom tiu katolika prezentado same kiel la Germanoj dum la antaŭa kongreso prezentis al siaj alilandaj samideanoj unu el siaj plej valoraj naciaj teatraĵoj, ankaŭ Hispanujo prezentis profundsentan teatraĵon „Mistero de Doloro“ de l' fama kataluna poeto *Gall*.



universala frateco, signita per ĝi, havas sian veran fonton en la Evangelio, en tiu parolo de Kristo: „Vi amu unuj la aliajn!“

Poste li klarigis al la katolikoj, ke ili devas pli ol aliaj, labori por la tutmonda frateco. Ĉio en la katolika religio predikas tiun fratecon. Do ili unuiĝu sub la komuna signo nun benita, kaj laboru por la plenumo de la devizo skribita sur ĝiaj faldoj.

Al la nekatolikaj samideanoj li diris: „Ne ridu! Ne moku nin, ĉar nian komunan simbolon, ĉar nian amatan standardon ni alportis ĉi tien piede de religia altaro, piede de la antikva Montserrat'a Virgulino. Ne moku, ĉar ĝin ni benigis de la pastro. Ni kredas, ke ni ĉiuj estas fratoj, kaj ke frateco supozigas komunan patron kaj komunan patrinon. Ne opiniu, ke pro tio ni estas malplibonaj apostoloj de la unuversala frateco. Ni kune laboru, vi nekredantoj kaj ni kredantoj laŭ la signifo de nia verda simbolo, en rekiproka estimo, amo, toleremo, ni kune laboru por la komuna celo, kiu bezonas laboron de ĉiuj.

Kaj sin turnante al la standardo li finis: „Vi simbolo amata, simbolo dufoje benita, ne timu! Vin tre alte ni tenos, ho verda standardo! Vi ĉeestos en niaj bataloj kaj la venkoj, kiujn per oraj literoj ni enkribos sur vi. Ili ne estas al tiuj, kiuj plorigas patrinojn kaj faras virinojn senedzaj aŭ junulinojn senĉianĉaj.... La venkoj, kies nomon vi portos sur viaj silkaj faldoj, estos venkoj de amo kaj paco: ĝojigaj benotaj venkoj, kiuj, multfoje ripetitaj, kondukos la homaron al la feliĉo kaj al la plenumo de nia devizo: „Unu ŝafaro kaj unu paŝtato.“

Poste la standardo estis rekondukita en la sanktejon kaj depozita antaŭ la piedoj de la antikva statuo de Mario, super la grandaltaro, kaj, laŭ la bela hispana kutimo ĝi estis tie dum la tuta nokto. La sekvintan tagon, post la matena meso ĝi estis reprenita, kaj de tiu tempo ĝi flirtis kaj estonte ĝi flirtos meze de ĉiuj katolikaj festoj kaj kongresoj. (57).

La sukcesplena Barcelona kongreso kaj la solena benfestoj Montserrat'a signifas al la katolikaj esperantistoj la gloran finon de dudekjara celkonscia laboro kaj la esperplenan komencon de nova tempo, de la granda estonteco, kiun la plej supera Paŝtato Papa Pio X<sup>a</sup> profete antaŭdiris per la gravaj vortoj: „Esperanto havas antaŭ si grandan estontecon.“ (58).

*P<sup>ro</sup> Fr. Meŝtan*

---

(57) Post la legado de tiu ĉi parolado ni nun bone komprenas la belegan poemon: „Prego sub la verda standardo“ de D<sup>ro</sup> Zamenhof. (En la aldono de la Fundamenton krestomatio).

(58) En privata aŭdienco donita al Frato Izidoro Clé, direktoro de la reĝa blindulejo en Woluwe(Belgujo) la 4<sup>an</sup> de Aprilo 1909<sup>a</sup>

# La Vortoj de l' Savanto.

de Viktoria Loitzenbauer.

---

---

Vi ofte plendas, ido kara.  
Ke estas via voj' malklara:  
Ho venu: *Mi la lumo estas,*  
En tiu lum' vi forta restas!

Vi ĝemas, ke la voj' mensogas,  
Ke la malbono vin delogas:  
*Mi estas la gvidant', la vojo,*  
Mi gvidas vin al hejm', al ĝojo.

Je ver' sopiras via koro,  
Sed daŭras la sopirdoloro:  
*Mi estas ver', se vi konfidos*  
Al font' de l' saĝo Mi vin gvidos!

Vi plendas, ke jam post momento  
— Folion kvazaŭ pelus vento —  
De l' viv' la em' kaj ĝojo pasas,  
La veon de l' disiĝ' postlasas.

Ne plendu: *Mi la vivo estas*  
Kaj por eterne manifestas!  
En ĝojfeliĉ' Mi ligos iam  
Kun viaj karaj vin por ĉiam.

*Esperantigita de kolonelo Zwach.*



# Oficialaj Komunikoj

## Statutoj de I.K.U.E.

### I Nomo kaj Sidejo.

La en Parizo la 1<sup>an</sup> de Aprilo 1910 fondita internacia asocio de katolikaj Esperantistoj estas la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE). La sidejo de IKUE estas la loko, kie loĝas la ĝenerala sekretario.

### II Celo.

IKUE celas laŭeble plej efike servi la interesojn de la katolikismo kaj de la katolikaro per Esperanto

### III Rimedoj.

Por atingi ĉi-tiun celon IKUE uzas ĉiujn honestajn rimedojn, precipe:

1. Ĝi klopodas starigi katolikajn esperantistajn ligojn en tiuj landoj aŭ regionoj, kie ilia ekzistado estas dezirinda por la celo de IKUE.

2. Ĝi okazigos internaciajn kongresojn por preparoli la katolikajn interesojn.

3. Ĝi faros enketojn pri diversaj movadoj, problemoj, ktp., kiuj rilatas la katolikismon.

4. Ĝi ebligos la eldonon de adresaro, revuoj, libroj, kaj aliaj presaĵoj utilaj por ĝia celo.

5. Ĝi starigos servan organizadon en ĉiuj landoj en laŭeble plej multaj urboj.

### IV Membroj.

Membro de IKUE estas nur tiu katolika landa ligo aŭ federacio, kies regularon aprobis la cefestraro de IKUE, kaj kiu estas paginta la kotizon.

Ligo aliĝonta devas konsisti el minimume 20 personoj. En lando, kie ne ankoraŭ ekzistas membriĝinta ligo aŭ federacio, katolikoj individuaj povas aliĝi kiel *individuaj membroj*, kondiĉe ke ili pagu la kotizon kaj abonu la oficialan organon; kiam ilia nombro estas minimume dudek, ili povas formi ligon, kaj aliĝi kiel *liga membro*.

### V Oficiala organo.

La oficiala organo de IKUE estas „Espero Katolika”, fondita de Pastro Em. Peltier, kaj nuna posedaĵo de la samnoma Akcia Societo.

## VI Monrimedoj.

La individuan jarkotizon ĉiujare fiksas la Ĉefestraro, aŭdinte la kasiston, kiu por tio ĉiujare kunmetas la budĝeton por la venonta jaro, kaj aŭdinte la opiniojn de la ĝenerala kunveno.

La financa jaro komencas la 1<sup>an</sup> de januaro kaj finas la 31<sup>an</sup> de decembro laŭ la Gregoria kalendaro.

Antaŭ la unua de majo la aliĝintaj ligoj aŭ federacioj devas esti pagintaj al la kasisto de IKUE sian kotizon laŭ la listo de siaj tiamaj membroj. Ankaŭ la individuaj membroj de IKUE devas esti pagintaj antaŭ tiu dato sian kotizon al la sama adreso. Tiu kotizo valoras por la tiama financa jaro.

Aliaj monrimedoj povas esti: donacoj, aŭ gajno per vendado de propagandiloj, libroj, ktp.

## VII La Internacia Komitato.

IKUE havas internacian komitaton, konsistantan el la prezidantoj kaj unu reprezentanto de ĉiu aliĝinta ligo aŭ federacio.

Tiuj landoj, kie ne ankoraŭ ekzistas aliĝinta ligo aŭ federacio, estas reprezentataj en la Internacia Komitato per unu individua membro polande, nomita por tiu celo, de la Ĉefestraro kiel *individua komitatano*.

## VIII Ĉefestraro.

Dum la ĝenerala jarkunveno la internacia komitato elektas el siaj membroj prezidanton, vicprezidanton, sekretarion kaj vic-sekretarion, kiuj kune konsistigas la ĉefestraron. Ĉiujare ekŝiĝos unu oficulo, la prezidanto en 1923, la vicprezidanto en 1924, la sekretario en 1925, kaj la vicsekretario en 1926. Ili tiam estos elektataj por 4 jaroj. La ekŝiĝantaj funkciuloj estas reelekteblaj. La sekretario samtempe estas kasisto de IKUE. La unua elekto de la ĉefestraro okazos laŭ la provizoraj aranĝoj de ĉi tiuj Statutoj.

## IX Tasko de la Ĉefestraro kaj de la Internacia Komitato

La Ĉefestraro zorgas pri la ĉiutaga administrado kaj kondukado de IKUE. La Internacia Komitato prizorgas la plenumadon de la kongresaj deziresprimoj kaj kontrolas la agadon de la ĉefestraro kaj de ĝiaj funkciuloj.

## X La Ĝenerala Kunveno.

La ĝenerala kunveno de la Internacia Komitato okazos dum la internacia katolika Esperanto-kongreso, aŭ, se iun jaron tiu kongreso ne okazos, je alia favora loko aŭ dato, laŭ decido de la ĉefestraro.

Pri internaj aferoj (administrado kaj kondukado de IKUE) ĉiu membro de la Internacia komitato havas unu voĉon po cento da individuaj membroj de sia ligo aŭ federacio, kaj unu pluan voĉon por la restanta centparto da membroj. Tiun membronombron estos kalkulita laŭ la kotizo, pagita de la ligo aŭ federacio antaŭ la unua de majo de la tiama jaro, aŭ — se la ĝenerala kunveno

okazas antaŭ tiu dato, — de la pasinta jaro. Individuaj Komitatanoj nur havas unu voĉon.

Pri neinternaj aferoj ĉiu membro de la Internacia Komitato havas unu voĉon. Ĉiu Komitatano, kiu ne eblas partopreni la kunvenon, povas, se lia ligo aŭ federacio tion aprobas, transdoni siajn rajtojn al unu el siaj kunkomitatoj per skriba de li signita rajtigilo, transdonata al la ĝenerala sekretario.

La plimulto de la voĉdonaj voĉoj decidās. Blankaj voĉdonoj ne valoras.

### **XI Detalara Regularo**

En aparta detalara regularo IKUE aranĝos ĉion, kio devas esti regulata por bone funkciigi la Unuiĝon. Tiu detalara regularo enhavos nenion kontraŭan al ĉi-tiuj Statutoj.

### **XII Ŝanĝoj en la Statutoj.**

La Statutoj estas ŝanĝeblaj nur post propono de la ĉefestraro aŭ de unu triono de la Internacia Komitato, kiun proponon la ĝenerala sekretario anoncas en la oficiala organo almenaŭ tri monatojn antaŭ la ĝenerala kunveno. La Statutŝanĝo nur efektiviĝos, se du trionoj de la plena Internacia Komitato ĝin akceptas.

### **XII Cesigo.**

La ĉesigo efektiviĝos laŭ la postuloj, cititaj en la antaŭ artikolo por la statutŝanĝo. Okaze de interkonsentita aŭ devigita ĉesigo la Ĉefestraro efektivigos la likvidadon kaj la disdonadon de la posedaĵoj.

### **XIV Provizoraj Aranĝoj.**

Al la voĉdonado kaj la preparolado de ĉi-tiuj Statutoj kaj de la Detalara Regularo povas partopreni ĉiuj personoj, kiuj, ĉeestante la ĝeneralan kunvenon de IKUE, dum Nia Sepa, kaj abonante al E.K., deziras esti konsiderataj kiel anoj de la IKUE de Richardson. Ili ankaŭ elektas la unuan definitivan Ĉefestraron.

---

## **Detalara Regularo.**

---

### **Artikolo 1.**

Kiam en iu lando ne ekzistas katolika Esperantista ligo membriĝinta, IKUE klopodas starigi tian ligon el siaj individuaj membroj laŭ la Statutoj.

### **Artikolo 2.**

Por la kongresoj kaj la ŝerva organizado IKUE kunmetos specialan regularon.

### **Artikolo 3.**

Enketojn, informiĝojn ktp, IKUE faros laŭeble per la landaj ligoj aŭ federacioj.

#### Artikolo 4.

Se en iu lando ekzistas diversaj katolikaj Esperanto-ligoj, ili aliĝu al IKUE kiel federacio, kiu por la interrilatoj kun IKUE elektas estraron, konsistantan minimume el tri personoj.

#### Artikolo 5.

La aliĝantaj ligoj aŭ federacioj pagantaj la kotizon. alvona membroliston laŭeble plej kompletan kun la adresoj kaj metioj aŭ funkcioj de siaj membroj.

Ĉiutrimonate la sekretarioj komuniku al la ĝenerala sekretario la eventualajn ŝanĝojn de siaj membrolistoj. Ankaŭ la aliĝantaj individuaj membroj, sendante siajn kotizojn, anoncu siajn kompletajn adresojn.

#### Artikolo 6.

La ricevitan kotizon la kasisto de IKUE komuniku en la unu-evenonta numero de la oficiala organo.

#### Artikolo 7.

La ĉefestraro reprezentas IKUE en juraj kaj nejuraj aferoj.

#### Artikolo 8.

La Ĉefestrara tasko estas la kondukado de IKUE al ĝia celo (II) per la rimedoj indikataj en la Statutoj (III), la preparado de la ĝenerala kunveno, kaj la plenumado de en ĝi esprimitaj deziroj kaj konkludoj.

#### Artikolo 9.

La prezidanto direktu ĉiujn kunvenojn, kaj li subskribu la oficialajn dokumentojn,

La ĝenerala sekretario estas la korespondanto por la Ĉefestraro, por la Internacia Komitato kaj por la ordinaraĵoj IKUE-aferoj. Li havu la arĥivon kaj kunmetu ĉiujare raporton pri IKUE dum la ĝenerala kunveno. Li ankaŭ faru raporton detalan de la kunvenoj de la Ĉefestraro kaj de la Internacia Komitato.

La kasisto, kontrolata de la ĉefestraranoj, administru la en- kaj elspezojn; en EK li raportu pri la pagintaj ligaj kaj individuaj membroj. En la ĝenerala kunveno li donu raporton pri la kaso kaj prezentu budĝeton por la venonta jaro.

#### Artikolo 10.

Tri monatojn antaŭ la ĝenerala kunveno la sekretario publikigu en EK la nomojn de la internaciaj komitatanoj kaj iliajn voĉnombrojn, menciante la eksiĝantajn personojn de la Ĉefestraro kaj la vakantaj funkcioj. En la sekvanta monato la aliĝintaj ligoj aŭ federacioj rajtas proponi kandidatojn por la eksiĝanta funkciisto aŭ la vakantaj funkcioj. La Ĉefestraro esploru, ĉu la kandidato akceptos la kondidatecon, kaj en la lasta EK numero antaŭ la ĝenerala kunveno la sekretario publikigu la alfabete presitajn nomojn de la kandidatoj. Se neniu kandidato estas proponita, la eksiĝanto estas reelektita.

# Teknika Religia Vortaro.

Verkita de Pro Bianchini, Pradis, de Cauzetto (Italujo).

## Daŭrigo.

La komenco troviĝas en la jarkolekto 1921.

Kunlaborantoj bonvolu sendi siajn korektojn kaj rimarkojn ĉiaspecajn al la redakcio de „Espero Katolika“.

### Mallongigoj:

Aa. actus apostolorum.	g. gramo.	l. liturgio.
b. Biblio.	G. Germana.	L. Latina:
cl. centilitro.	Gr. Greka.	m. metro.
cm. centimetro.	Hb. Hebrea.	mm. milimetro.
dl. decilitro.	Hs. Hispana.	mz. muziko.
hg. hektogramo.	h. historio.	M. T. Malnova Testamento.
hl. hektolitro.	I. Itala	N. T. Nova Testamento.
et. etimologio.	j. juro,	mt. mitologio.
f. filozofio.	kl. kilogramo.	t. teologio.
F. Franca.	km. Kilometro.	V. Vidu.

**Baltee** (b) L. Balteum; zono larda 3—4 fingrojn kaj longa 30 brakojn (El. 39; Lev, 16), signifas forton kaj persistemon Ef. 6, 4).

**Balustrado** (l) aro de supre kunigitaj per mallarĝa ŝtona tabuleto kolonetoj, staras barile inter la presbiterejo kaj la navo de preĝejo; la fideluloj tie akceptas la sanktan komunon. Al virinoj estas malpermesite, pasi tra ĝi dum Diservo.

**Balzamo** (l) L. Balsamum, bonodora substanco rezina de vegetaĵoj (Kabe); memore je 2 kor 2, 16; Filip. 4, 8, la Kristanoj konservis en la liturgio la uzadon de balzamoj, kiun oni miksas kun sankta oleo. V Kisma.

\***Banaŭsia** (t) L. banausia; malvirto malŝata je modesta sinteno.

**Bankisto** (t) L. nummularius; permesata, kiam li pagigis laŭleĝajn procentojn.

**Bankistoj** (b) ekzistis ĉe la Hebreoj tute similaj al niatempaj (Mat 18. 24).

**Banko** (j) instituto ŝtata aŭ privata por monaj negocoj (pruntoj, kambioj, ĉekoj k. a. (Kabe).

**Bankroti** (t) L. cessio bonorum; ĉesi paĝi la komercajn ŝuldojn kaj lasi deklari pri tio oficiale (Kabe); konsciencie tio ne liberigas la ŝuldanton de la devo, estonte pagi al la kredidintoj.

\***Banna** (t) V. Publikaĵoj.

**Baptejo** (l) loko por bapto en preĝejo.

**Baptisto** (b) L. Joannes Batista; filo de la sanktaj Zakario kaj Elezabeto' antaŭiranto de Jezuo Kristo, unu el la plej grandaj sanktuloj primemorigataj en la evangelioj; mortigita laŭ ordono de Herodo.

\***Baptizo** (b) L. Baptizo; laŭleĝa lavo de la Hebreoj purigante de laŭleĝaj malpuraĵoj.

**Bapto** (t) L. Baptismus; la unua sakramento necesa al ĉiu por forigo de la deneva peko (origina de niaj pragepatroj) donas al la animo la Kristanan karakteron. igas nin esti heredantoj de la ĉielo kaj pretigas nin por ricevo de aliaj sakramentoj. Baptano estas partoprenanto en la ceremonio de bapto kaj akompanas la baptaton. Baptopatro prezentas la baptaton al bapto, tenas la baptatan infanon sur siaj manoj dum la ceremonio (Kabe).

**Baptujo** (l) L. fons baptismatis; intenanta akvon, per kiu oni baptas (Verax). Paroĥestro devas beni tian akvon la sabaton antaŭ Pasko kaj la sabaton antaŭ Pentekosto.

**Barabo** (b) krimulo liberigita anstataŭ Kristo.

**Barbaroj** (h) popoloj tiel nomitaj de la Grekoj, ĉar ne parolantaj la Grekan lingvon; sovaĝmoraj ili venis dum Mezepoko el norda Eŭropo kaj el Azio en Latinajn landojn.



**Barjona** (b) nomo de 'l S<sup>a</sup> Petro antaŭ lia elekto kiel la ĉefo de la apostoloj (Mat 16, 17).

**Barkokebo** (h) L. Barcochebbas; barcozebah (filo de mensogo) ŝanĝis sian nomon en Bar-cochebas, filo de stelo) kaj proklamis sin la mesio. Multaj lin sekvis, ĝis kiam li kun liaj anoj estis mortigata laŭ ordono de la imperiestro Hadriano.

**Barnabo Sankta** (b) L. Barnabas; disĉiplo de Jesuo Kristo, kunulo de S<sup>a</sup> Paŭlo, predikis la evangelion sur la insulo Cipro.

**Barnabitoj** (h) religia frataro fondita en Milano de Antonio Mario Zaccaria 1530.

**Baronio Cezare** (h), 1599—1607, kardinalo, la aŭtoro de *Annali ecclesiastici*, multvalora verko pri la tuta eklezia historio ĝis 1198; disĉiplo de S<sup>a</sup> Filipo Neri.

\***Bar-el-Aplud** (h) = blanka rivero; la supra parto de Nilo.

\***Bar-el-Azrek** (h) = lazura rivero: supra alfluo al Nilo.

**Barbo** (b) L. barba; Dio malpermesis al la Israelidoj razi la vangojn kaj la mentonon laŭidolane. Tertuliano diras: Ili per raziloj hontigas sian vizaĝon, estas malpiuloj ĉe kun siaj vangoj. S<sup>a</sup> Cipriano nomas la razokutimon signo de malprogreso de popoloj. La apostolaj konstitucioj tute malpermesis al Kristanoj, razi sin.

**Bartolomeo** (b) L. Bartolomaeus; unu el la 12 apostoloj; predikis la evangelion en Hindujo kaj Likaonujo, mortis martiro en Armenujo. Liaj relikvioj estas en Roma sur Tiber-insulo.

**Batanujo** (b) L. Batanea<sup>Gr.</sup> En N. T. la nomo de la regiono trans Jordana Basano.

\***Baruch** (b) profeto kaj skribisto de Jeremio, verkis unu el la libroj de Biblio (584 a. K.). Al li estas alskribita apokrifa interesa libro „Apokalipso de Baruch” konservita per

Sira traduko.

**Basano** (b) L. Basan; fruktoporta regiono trans-Jordana. Oni nomis basan kio estis graso kaj gaja en paŝtejoj. En N.T. = Batanaca.

**Bastardo** (j) L. illegitimus; infano naskita eksteredziĝo (Kabe). Bastardo ne estas akcepteblaj sen speciala papa permeso en seminarioj, nek sacerdotiĝi. Nepre malpermesite estas al ili episkopiĝi kaj kardinaliĝi.

\***Bathus** (b) V. Bad.

**Bazildo** (h) L. Basiliades parto de la urbo Cezareo (L. Caesaraea) kie S<sup>a</sup> Bazilio fondis multajn karitajn instituciojn.

**Bazillo de Ancira** (b) herezulo dum la IV<sup>a</sup> cj.

— la Granda, sankta (h) (329—379) naskiĝis en Pontuso el nobla riĉa familio; estis unu el la plej kleraj de la sanktaj patroj en la orientlanda eklezio, verkis multajn librojn doktrinajn.

**Beateco** (t) L. beatitudo: feliĉego kiun ĝuas la Sanktuloj en la ĉielo, nekomprenebla surtere nek preskribebla

**Beatigo** (t) L. beatificatio; ago, per kiu papo permesas, ke iu Diservulo estu honorata en iu loko per speciala publika kulto sub la titolo: beata.

**Beatoj** (t) L. Beati; kiuj venis al feliĉa perfektigo en la eterna vivo, vidante kaj ĝuante Dion.

\***Beda** (h) Angla sacerdoto (672—735) piega tre fama klerulo kaj verkisto.

**Beelfegor** (b) idolo de Moabidoj pro ĝia nudeco protektanto de diboĉuloj, honorata per abomenindaj malŝastaĵoj (Nombr 21, P-, 106).

Daŭrigota

Se ekster la ĝenerala kunveno iu funkciulo eksiĝas, la vic-funkciulo lin anstataŭas ĝis la ĝenerala kunveno.

La voĉdonado pri personoj fariĝu skribe.

Artikolo 11.

Nek la ligaj, nek la individuaj membroj rajtas juĝe apelacii IKUE aŭ ĝian Ĉefestraron aŭ ĝian Internacian Komitaton.

Artikolo 12.

Ĉiu ligo aŭ federacio zorgu, ke ĝiaj membroj, ĉu persone, ĉu grupe, estu abonintaj al EK.

Nescio de ia oficiala komunikaĵo, publikigita en la oficiala organo, neniam iun IKUE-azon senkulpigas.

Artikolo 13.

Pri aferoj, pri kiuj ne decidas la Statutoj de IKUE aŭ ĉi-tiu Detalara Regularo, la Ĉefestraro decidas ĝis la ĝenerala kunveno kiu findecidas.

Artikolo 14.

Ŝanĝojn en ĉi-tiu Detalara Regularo povas fari la Internacia Komitato kaj ankaŭ la ĝenerala kunveno, se la plimulto de la voĉdonoj akceptas la ŝanĝojn.

Samtempe ĝi fiksi la daton de la ŝanĝvaloriĝo.

---

## Regularo

### pri la Serva Organizado de I.K.U.E.

Art. 1.

La celo de la Serva Organizado estas, helpi la membrojn de IKUE en ĉiuj aferoj en kiuj la diverslingveco estas ĝenanta, ekzemple dum vojaĝoj eksterlandaj, por komercaj interrilatoj, por informoj ktp.

Art. 2.

La administradon de la Serva Organizado faras la Centra Oficejo, starigata de IKUE.

Art. 3.

En ĉiu lando IKUE klopodas starigi Landan Oficejon, en la ĉefaj urboj ĝi elektos unu aŭ pluajn konsulojn.

Art. 4.

Se en iu urbo estas pluaj konsuloj, tiuj-ĉi havu apartajn taskojn: por la religiaj aferoj, por fraŭlinoj, por la junuloj ktp.; unu el ili estu la ĉefkonsulo.

Art. 5.

Konsuloj por religiaj aferoj estu pastroj, por fraŭlinoj estu virinoj aŭ fraŭlinoj. La ĉefkonsulo dividu la taskojn.

## Art. 6.

La Landa Oficejo klopodu trovi indajn kaj fervorajn membrojn de IKUE, kiuj deziras akcepti la konsulecon, ĝi proponu tiujn personojn por tio al la Centra Oficejo, ĝi faros propagandon por IKUE kaj la Esperanto-movado inter la katolikoj, ĝi disdonas aŭ disvendas propagandilojn, ĉu nacilingvaj, ĉu esperantlingvaj, kaj ĉiujare sendas raporton pri sia agado el la Centra Oficejo.

## Art. 7

Persono, akceptante la konsulecon, promesas laŭpove helpi ĉiujn membrojn de IKUE kiuj petas lian helpon. Li neniam estas devigata helpi se ne iamaniere la repago de la por tio necesaj elspezoj estas garantiita.

## Art. 8,

La Centra-Oficestro ĉiujare donas raporton pri le<sup>o</sup>Serva Organizado al la ĝenerala kunveno.

N.B. — La Kongresregularo jam estas publikigita en EK n<sup>o</sup> 126 [Marto 1922], p 157.

---

# Internacia Akcia Societo „Espero Katolika”

## Al la akciuloj!

Estimataj Gesinjoroj!

Laŭ art. 17 de la Statutoj antaŭ la 15<sup>a</sup> de junio okazos la ĵarkunveno de la komisaroj kaj direktoroj de EK, en kiu ili fiksos la agendon por la ĝenerala kunveno, okazonta dum Nia Sepa.

Ni tial petas la akciulojn sendi siajn proponojn por tiu ĝenerala kunveno antaŭ la 1<sup>a</sup> de junio al ĉi-suba adreso, ĉar, laŭ art. 23 „ne estas permesate preni en la ĝenerala kunveno decidojn pri temoj, kiuj ne estas publikigitaj en la agendo”

La Prezidanto-komisararo de EK.  
P. A. Schendeler.

## Niaj Regularoj.

En ĉi-tiu numero de EK la leganto trovas la projekton de la Statutoj de IKUE. de la Detalara Regularo kaj de la Regularo pri la Serva Organizado de IKUE. Tiujn regularojn ni pritraktos dum „Nia Sepa” Tamen ni por tio ne foruzu tro multe da tempo. Ŝanĝproponojn oni sendu jam antaŭ la kongreso al suba adreso. Oni ne forgesu ke nur la praktiko montras la verajn mankojn, kaj tial eble estus bone, ke dum „Nia Sepa” ni akceptu la regularojn provizore por unu jaro por ke la praktiko montru kio estas

ŝanĝinda. Ni atentigas pri tio, ke laŭ la Statutoj XIV „Provizoraj Aranĝoj” povas partopreni al la voĉdonado kaj la preparolado „ĉiuj personoj, kiuj, ĉeestante la ĝeneralan kunvenon de IKUE dum Nia Sepa, kaj abonante al EK, deziras esti konsiderataj kiel anoj de la IKUE de Richardson.”

Do, ĉiuj kiuj jam sendis sian abonmonon por ĉi-tiu jaro, aŭ por la lasta duonjaro, povas influi la starigon de la regularoj kaj la elektadon de la Ĉefestraro.

P. A. Schendeler.  
Prins Hendrikstraat 30<sup>E</sup>  
Eindhoven (Nederlando).

---

# Katolika Esperanto-movado

---

## „Nia Sepa”

plej verŝajne okazos en la bela kaj rimarkinda urbo Nijmegen, Nederlando. — Tuj post kiam la Estraro de IKUE estas definitive decidintaj, la antaŭpreparoj fervore komenciĝos, tiel ke niaj legantoj povas atendi en la unuevenonta EK-numero la unuajn komunikaĵojn pri la detaloj.

## Laborista Letero el Aŭstrio.

Tiu eraras, kiu opinias, ke la vivkondiĉoj de la laboristaro en Aŭstrio estis pliboniĝintaj per la revolucio 1918. La sumoj ricevataj ĉiusemajne kiel salajroj ŝajnas grandaj, sed nur ŝajne, ĉar la plimulto de la laboristoj ne povas ekzisti malgraŭ tiuj sumoj. La prezoj de la vivaĵoj kaj de la vestaĵoj estas tiel multekostaj, ke la plej multaj homoj estas malsataj kaj iras en difektitaj vestoj. Se la laboristaro ne volas, ke ĝiaj infanoj ne mortu pro manko da plej necesaj vivnecesaĵoj, ili devas esti forsendataj al fremdaj, sed bonkoraj homoj en diversaj aliaj landoj.

Kvankam ŝajnas, ke la laboristoj havas ĉie la gvidantajn rolojn, vere estas la laboristaro pli sklava, ol antaŭ la revolucio.

Kial?

Ĉar ĉie regas senkredemuloj kaj kontraŭuloj de ĉia religio.

Tiuj regantoj plenigis siajn anojn jam longan tempon antaŭ la revolucio per ideoj perversaj. Tiuj gvidantoj forrabis sisteme el laboristaro konsciencan, religian konfeson, la laboremon, justecan

senton kaj finfine la trankvilon. Ili deklaris la gelaboristojn kiel proletarianojn kaj tiakaŭze la fabrikantoj, komercistoj kaj entreprenistoj ne estimis la laboristaron kiel samvalora burĝaro de la ŝtato, ĉar la gelaboristoj ne volis esti burĝoj, sed nur proletarianoj.

Estas vereco ke la plimulto de la laboristoj kaj laboristinoj ne estas laboremaj, Se tiel estas, la kialojn faris ĉefe la fabrikantoj, komercistoj, entreprenistoj, unuvorte la „sinjoroj”, ĉar ĉi tiuj ankaŭ ne ŝatis kaj ŝatas la veran, valorkreantan laboron. Ili funkcias kaj funkcias kiel ŝovistoj kaj ne laboremuloj.

Ĉie valoras nur la profito kaj preskaŭ nenie la laboro.

Se ni volas ŝanĝi tion, ni devas plenigi per vera justeco, justeca sento, pensado kaj agado ne nur la laboristaron sed ankaŭ la entreprenistaron.

Ni devas rekonduki nian frataron al la kristaneco de la apostolaj tempoj.

Se devas esti rekonstruata la mondo, oni devas ĝin rekonstrui nur laŭ la principoj de la kristaneco.

Tial:

Laboristaroj kristanaj de la tuta mondo! Faru ni fortan ringon kontraŭ socialismo, bolŝevismo kaj komunismo kaj per vera libereco, egaleco, frateco!

Fondiĝu ĉie esperantistaj grupoj de la kristanaj laboristaroj kaj interkonsentu kun ni, por ke ni ĉiuj agu, propagandu kaj laboru laŭ unu destina kaj sama plano.

Ni laboristoj kristanaj de Aŭstrio estas irontaj tiun vojon prenante sur ni la krucon kaj sekvante nian majstron Jesu-Kriston.

Kiu sekvos?

Esperantistaj laboristoj kaj laboristinoj kristanaj de la tutmondo ni salutas vin!

Bennogasse 5,  
Wien VIII, Aŭstrujo.

Esperantista laboristaro  
kristana de Aŭstrio.

---

## El diversaj landoj.

### Aŭstrujo.

La 2<sup>an</sup> de Aprilo 1922 okazis en *Wien*, en la kapelo de la katolika submajstra domo, katolika posttagmeza Esperanto-Diservo. Predikis esperantlingve P<sup>ro</sup> Georg. Plank.

La katolikaj esp. laboristoj en Wien fervore agadas. Esperu ni, ke la sama fervoro, kiu entuziasmigas tiujn samideanojn, baldaŭ entuziasmigas ankaŭ ĉiujn rondojn de katolikaj Esperantistoj. Ni ĉie verkiĝu kaj rekomencu la laboron!

Supra alvoko al la kat. esp. laboristaro tutmonda certe vekos ĉiufanke eĥon. kaj espereble baldaŭ kondukos al internacia kunlaboro.

La samaj samideanoj turnis sin lasttempe ankaŭ al la gvidantoj de la kristana laboristaro en Aŭstrujo kaj al eminentuloj de la katolika popolo, kaj ili ricevis jam kelkajn tre fervorajn respondojn. La demandoj koncernas la spertojn de tiuj ĉi personoj pri la mondhelplingvo ĝenerale kaj precipe ankaŭ pri Esperanto.

## Germanujo.

La landa Oficejo de IKUE por Germanujo eldonis „Mitteilungsblatt (komunikaĵa Folieto) der Geschäftsstelle der IKUE für Deutschland“. Bamberg-Strullendorf.

Certe tiaj malgrandaj gazetoj en nacia lingvo estas plej utilaj, eĉ necesaj, por nia movado. En ĝi ni legas: instigon por ree unuigi la katolikajn Esperantistojn en Germanujo post la malapero de „Buked“ (Germ. Ligo de Kat. Esp.); inviton por aboni EK, por aliĝi kiel „konsulo de IKUE“ kaj por apogi la kason de la Oficejo; rekomendata estas la korespondo kun eksterlandaj samideanoj kiel fonto de ĝuo kaj profito. Ni gratulas la Oficestron pro lia certe fruktodononta iniciato.

## Nederlando.

Dum la Ĝenerala Kunveno de „Nederlanda Katoliko“, Jan. 1922, estis decidite eldoni „Mededeelingen“ (Komunikaĵoj) de la Ned. Kat. Esp. Ligo; S<sup>ro</sup> Schendeler estis elektita redaktoro.

Ĝis nun aperis 3 numeroj, kiuj tre bele aspektas kaj kiuj certe en neesperantista kaj esperantista publiko nederlanda vekos pli kaj pli da interesiĝo en nia kara movado. El la Komunikaĵoj mi alĉerpas: La etraro de „Nederlanda Katoliko“ estas: prezidanto, S<sup>ro</sup> J. Pastoor; sekretario, S<sup>ro</sup> H. B. Zwet; kasisto, S<sup>ro</sup> F. Marreeve; estrarmembroj, F<sup>ino</sup> A. Beek, P<sup>ro</sup> Call. Preller O.P., S<sup>ro</sup> P. A. Schendeler kaj D<sup>ro</sup> Smulders. — La diversaj komisionoj denove estas refunkciigitaj: Komisiono por la Gazetaro: P<sup>ro</sup> Preller, S<sup>roj</sup> Schendeler kaj Pastoor; — Komisiono por legado kaj studado: P<sup>ro</sup> D<sup>ro</sup> Titus Brandsma, Ord. Carm., S<sup>roj</sup> Kools kaj Schendeler; — Komisiono pri informoj kaj internaciaj interesoj: S<sup>ro</sup> Roelofs kaj Koolen; — Komisiono por propagando; S<sup>ro</sup> P. Heilker kaj P<sup>ro</sup> Preller; — Komisiono por la biblioteko: la kat. Esp. grupo en Helmond.

La membroj de N.K. konsistas el individuaj membroj kaj lokaj unuiĝoj. De tiuj lastoj aliĝis al NK. la unuiĝoj en Alkmaar, Kuiklando, Hago, Helmond, 's-Hertogenbosch (1. la ĝenerala unuiĝo; 2. la unuiĝo de kat. Esp. laboristoj) Nijmegen, Roermond kaj Wormerveer. La unuiĝoj en Tilburg, Ootmarsum kaj Rotterdam ne donis ankoraŭ vivosignon.

En N<sup>o</sup> 3 de la „Komunikaĵoj de N.K.“ troviĝas grava propraganda artikolo pri „Esperanto en la lernejoj“ La nova ŝtatleĝo por la lernejoj forigis la instruadon de la franca lingvo el la unuagradaj lernejoj. Nun kelkiuj klopodas influi la nederlandan registaron por reenkonduki la instruadon de la franca lingvo. Laŭ iniciato „Nederlanda Katoliko“, la Ned. Kat. Ligo „N.K.“ kaj la Ned. Esp. Ligo „L.E.E.N“ estas sendintaj petskribon al la Ministro por Instruado kaj Sciencoj, per ne enkonduki iun ajn nacian lingvon, sed jes Esperanton. Esperu ni, ke tiu klopodo trovu sukceson. La sama ministro sendis jam oficialan deligiton al la XII kaj la XIII Universalaj E. kongresoj kaj al la Internacia Konferenco en Genève, ĵus okazinta.

Tre ĝojiga estas la fakto, ke, tie ĉi kaj tie, pli ol unu kompetenta katolika samideano verkis aŭ originalajn aŭ tradukitajn katolikajn verkojn. Precipe estas laŭdinda, ke oni elektis ankaŭ tiujn verkojn, kiuj entenas la elementajn katolikajn terminojn en la kunteksto.<sup>6</sup> Certe tiu metodo estas la plej bona por fine akiri la kompletan kaj ĝustcencan katolikan terminaron. Ni poste reparolos pri tiu ĉi grava temo.

---

## Esperanto-Movado.

EK havas tro malmulte da loko por detale informi pri la ĝenerala Esperanto-movado, kiu pli kaj pli kreskas je amplekso kaj graveco. Ni tamen intencas regule sciigi la plej gravajn faktojn. Kiuj deziras rapide aĝ bonege esti informata pri nia movado, abonu al la *ĉiusemajna* gazeto.

### Esperanto Triumfonta,

ĝenerala internacia gazeto, adreso: E. T. Horrem bei Köln, Germ. Ni tre rekomendas ĝin al niaj legantoj.

### Esperanto-Kongresoj.

Nia movado faris unu paŝon pluen sur la vojo al fina sukceso. Nova okazaĵo de plej granda seriozeco estas la

#### Internacia Konferenco en Genève pri instruado de Esperanto en lernejoj.

Ĝi okazis 18-20 Aprilo. En E.T. n<sup>o</sup> 80 ni trovas la detalan programon kaj en n<sup>o</sup> 82 (30 Aprilo 1922) la oficialan delegitaran liston kaj raporto kun paroladoj. Unuafoje nia afero estis reprezentata *oficiale*. La nombro de la oficialaj delegitoj de diversaj Registaroj kaj Asocioj estis 96 el 28 landoj; efektivaj delegitoj kaj fakuloj. 13 gravaj organizaĵoj estis reprezentataj, inter ili: la Ligo de Nacioj, Internacia Labor-oficejo, Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco, ktp.

La laborkunsidoj okazis en la Palaco de la Ligo de Nacioj; la Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj diris bonvenan paroladon. Lau raportanto en „E.T.” „malgraŭ seriozaj kaj severaj ekzamenoj kaj diskutoj ĉio, kio estis proponita por Esperanto, estas aprobita kaj akceptita laŭ programo. La gastoj, komence aŭdinte la anglalingvan salutparoladon de l' Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj, pli ol miris, kiam ili poste dum tagoj aŭdis nur unulingvajn diskutojn ne malfaciligintajn per interpretado. Ĉu ne multaj el ili memoris je la kunsidoj de la Ligo de Nacioj?—?—”... „Kvankam preskaŭ tro multa, la tuta laboro estas farita dum laŭ programa tempo sub la gvidado de S<sup>ro</sup> Privat, kiu — same energie kiel afable — prezidis la kunsidojn kaj modele estris la tutan materion.

La iniciatintoj de tiu ĉi gravega konferenco meritas varman dankon kaj gratulon, precipe la prezidanto D<sup>ro</sup> E. Privat.

### XIV<sup>a</sup> Universala Esperanto-Kongres

en Helsinki-Helsingfors, Finnlando, 8 — 16 Aŭgusto 1922, antaŭvidigas belan sukceson. La Finnlanda registaro subvenciis la kongreson je 50,000 f. Mk. La nombro de aliĝintoj estis 1 Aprilo jam 230 personoj el 20 landoj. La adreso de la Loka Kongresa Komitato estas: XIV<sup>a</sup> Kongreso de Esperanto, Helsinki, Finnlando.



# Leteroj el Nederlando.

## II.

En nia lando regas vigla katolika vivo. Ĝi ne montriĝas per brilaj procesioj, ĉar tiuj estas ĝis nun leĝe malpermesataj, ili nur povas okazi en la preĝejoj, aŭ almenaŭ en lokoj ĉirkaŭbaritaj kaj ne destinataj por la publika vojirado. Nur iom pli ol triono de la Nederlanda popolo estas katolika, kaj tiu parto preskaŭ tute loĝas en la sudo de nia lando. La nordnederlandaj katolikoj do vivas meze de alireligianoj, kiuj tie formas la plimulton; en la suda landparto tamen preskaŭ ĉiuj vilaĝoj estas nurkatolikaj, sed en la urboj tieaj ankaŭ loĝas sufica nombro da Protestantoj kaj Hebreoj. Sed malgraŭ tio (aŭ ĉu eble tial?) la Nederlanda katoliko estas konscia pri sia religio, kaj serĉante sian forton en la unuigo, li sukcesis atingi gravajn rezultatojn rilate la religia, la sociala kaj la politika vivo.

Granda estas la estimo kiun la nederlanda katoliko havas por sia episkopo kaj siaj pastroj, kaj gvidata de siaj religiaj aŭtoritatoj li dum jarcentoj oferis grandegajn sumojn por siaj preĝejoj kaj por la katolikprincipa instruado. Certe nuntempe, post pli ol duonjarcento da agado, la katolikaj lernejoj laŭleĝe egalas ĉiuflanke la neŭtralajn lernejojn. Sed ĝis antaŭ nelonge la ŝtato nur subvenciis la tiel nomatajn neŭtralajn lernejojn, kaj malmulte da salajro ĝi pagis al la instruistoj de la katolikprincipaj lernejoj, tiel ke la katolikoj mem devis monhelpi sian propran instruadon, kvankam per iliaj impostoj la ŝtato preskaŭ eksklusive helpis la instruadon neŭtralan, kiun katoliko ne povas preferi. Multe da novaj paroĥoj fondiĝis dum la lastaj jaroj, paroĥojn, kies preĝejojn fondis, kies pastraron subtenas la katolikaro, ĉar ankaŭ por tiu celo la leĝo ne permesas eldoni la ŝtatan monon.

Unuiĝintaj sub siaj episkopoj la nederlandaj katolikoj sentis sian forton, kaj gravajn atingis rezultatojn sur le socialviva kampo. Sennombraj estas la ligoj kiuj kunigas kaj kunlaborigas la katolikojn samrangajn. Terkulturistoj, metiistoj, negociistoj, instruistoj, mezlesnejaj profesoroj, oficistoj, suboficiroj, laboristoj kaj laborigistoj katolikaj, ĉiuj havas siajn specialajn ligojn, alcelantajn la respektigon de la rajtoj de siaj membroj laŭ la katolikaj principoj, sed dume montrantajn ankaŭ al ili iliajn devojn. Kaj la akuratan praktikigon de la katolikaj principoj prizorgas en ĉiu ligo la religia konsilanto, pastro, por tio nomita de sia episkopo. Kaj super ĉiuj-ĉi ligoj katolikaj staras la Centra Organizaĵo, konata en Nederlando kiel K.S.A., tio estas: „Katolika Sociala Agado”, kies granda celo estas: Unuigi en unu granda tutlanda organizaĵo ĉiujn nederlandajn ka-

tolikojn, kaj ebligi per centra oficejo, ke la katolikaj socialaj principoj kaj la praktikaj socialaj institutoj estu vaste diskonigataj.

Ĉiuj-ĉi katolikaj ligoj laŭ episkopa ordono ne okupiĝas pri politiko, sed la firma konvinko pri ilia rajto kaj devo kiel katolikaj ŝtatanoj alkondukas la katolikojn al la specialaj elektantunuiĝoj katolikaj, en kiuj, tute sendepende de iu sociala ligo, la metiisto kune kun la instruisto, la oficisto ktp. elektas la personojn kiujn li kredas indaj por reprezenti la katolikaron nederlandan en la Parlamento, por tie defendi ĝiajn rajtojn, kaj kunlabori por ke la lando estu regata laŭ la nurveraj katolikaj principoj.

Jen, kiel la nederlandaj katolikoj, kvankam formante la malplimulton en Nederlando, sukcesis starigi la plej grandan kaj plej fortan politikan grupon en la Parlamento, tiel ke de post la mondmilito nia lando havas principe-katolikan ministro-prezidanto kaj kristanan ministerion, kju nure pruvis laŭprincipe regadpovi dum ĉi-tiuj kritikaj tempoj.

Ho, se tiuj principoj povus influi la tutan mondon!

Feliĉan Paskon!

P. A. S.

---

## Lingvaj Demandoj kaj Lingvosciencia Metodo.

Ĉiu ajn scienco povas atingi sian propran celon nur, se ĝi uzas konvenan propran metodon, kiu taŭgas por la esplorota objekto. Same, kiel ĉiu alia scienco, la lingvistiko devas uzi, esplorante la lingvajn demandojn, la konvenan propran lingvosciencan metodon.

Tiun ĉi tute simplan kaj evidentan principon bedaŭrinde ofte forgesis kaj ankoraŭ forgesas multaj Esperantistoj, kiuj konstante aplikas al la solvo de lingvaj demandoj ian tute fremdan kaj ne-taŭgan metodon. La matematikistoj certe mokridus ĉiun malsaĝulon, kiu pretendus solvi matematikajn problemojn per biologia aŭ psikologia aŭ historia metodo. Strange estas, ke oni ne miras, vidante matematikistojn aŭ matematikemulojn diskuti pri lingvaj demandoj laŭ tute maltaŭga kaj kontraŭcela metodo, ĉar lingvo ne estas matematikaĵo.

S-oj Couturat kaj de Saussure, estante ambaŭ matematikistoj, iniciatis la eraran aplikon de la matematika metodo al la esplorado pri nia lingvo, kaj poste, kelkaj estimindaj Esperantistoj, erarigitaj de la ekzemplo liverita de homoj, kies altvaloro kaj merito estas nediskutebla, ĉiumonate publikas en niaj gazetoj prilingvajn artikolojn, kiuj povus esti ĝustaj kaj trafaj, se ili koncernus eksklude

la teknikan lingvon, sed kiuj estas tute maltrafaj kaj eraraj, se oni pretendas, ke ili koncernas la komunan lingvon.

Al tiaj tro matematikemaj lingvistoj la ĵus publikita, majstra libro de Prof. Aymonier pri la „Derivado en naturaj kaj en artaj lingvoj (Essai sur la dérivation comparée dans les langues naturelles et artificielles) prave montras la sekvindan vojon kaj la uzindan metodon. Tiu ĉi pure scienca kaj objektiva libreto, verkita de vera kaj klera lingvisto, konkludas post plena pruvado, ke ne nur la vortkunmetado sed ankaŭ la derivado obeas samajn principojn kaj regulojn en Esperanto kaj en la naturaj lingvoj. „Esperanto, sek-vante procedojn, kiuj estas kutimaj al la homa spirito, celas la ŝparadon de la peno kaj la atingon de klareco per plej eble malmultaj rimedoj kaj materialoj, ne starigante apartajn arbitrajn regulojn. . . Tiel ĝi efektivigis la maksimumon da natureco akordigebla kun la maksimumo da logikeco, kaj ĝi trafis plej grandan facilecon kune kun plej granda klareco.”

Esperanto diferencas je la naturaj lingvoj nur per sia pli granda reguleco kaj simpleco, sed Prof. Aymonier pravas per konvinkaj ekzemploj, ke ankaŭ la naturaj lingvoj pli kaj pli emas al reguleco kaj simpleco kaj iom post iom alproksimiĝas al tiuj kvalitoj.

Niaj matematikemaj nunaj lingvistoj, tute same, kiel la Idistoj, rigardas la vorterojn kiel nombrojn aŭ ciferojn, kiuj havas fiksajn kaj senŝanĝajn valorojn; ili diskutas pri la senco de la kunmetitaj aŭ de la derivitaj vortoj konsiderante ilin kiel matematikan ekvacion.

Kontraŭe Prof. Aymonier atentigas, ke „en la naturaj lingvoj neniu kunmetita nek derivita vorto estas plenesprima kaj eksplicita; ke estas plio en la vorto ol en la sumigo de ĝiaj eroj; ke elipso (forlaso de vortero) regas ne nur la vortkunmetadon sed ankaŭ la derivadon” La samon oni konstatas en Esperanto: en nia artefarita lingvo tute same, kiel en la naturaj lingvoj, ĉia vortklasa finaĵo, ĉia afikso povas „montri tre diferencajn rilatojn, kiuj restas neesprimitaj, ĉar la spirito plenigas la mankon” La ĝustan signifon precizigas ne nur la kunteksto, sed ankaŭ precipe la naturaj efektivaj rilatoj de la ideo esprimata de la radiko kaj la bezonoj aŭ oportunaĵoj de la praktiko.

Estus tre dezirinde, ke ĉiuj Esperantistoj, kiuj interesas sin pri lingvaj demandoj kaj volonte pridiskutas ilin, atente tralegu la majstran verkon de Prof. Aymonier kaj plene profitu ĝin. Tio evitigus al ili tro oftajn diskutojn kaj tro akrajn kritikojn, kiuj estas bazitaj sur principa idista eraro. Ekzemple ili ne kritikis la vorton **korekti**, dirante, ke ĝi estas neĝusta kaj malbona, kaj ke oni devas anstataŭigi ĝin per la vorto **korektigi**, ĉar la finaĵo **-i** kun adjektivo egalvaloras nur „esti” sekve la vorto **korekti** signifas **esti korekta**, sed ne povas signifi **igi korekta**. Tia mate-

matika rezono estas maltrafa: la finaĵo -i egalvaloras nek „esti” nek „fari” nek iun alian vorton; la U, V. simple instruas, ke -i montras la verbon. Do se oni aldonas la finaĵon -i al adjektiva aŭ substantiva radiko, oni ne povas trovi la signifon de la ricevita verbo per simpla adicio, la ĝustan rilaton inter la radiko kaj la derivita verbo difinas kaj precizigas nur la naturo de la ideo kaj la bezonoj de la praktikoj. Nu, ĉar en la praktiko oni neniel aŭ treege malofte bezonas unuvortan verbon por signifi „esti korekta”, dum kontraŭe oni ofte bezonas verbon signifantan „igi korekta”, la verbo rekte derivita de la radiko nature ricevas tiun ĉi plej oftan kaj plej bezonatan signifon. La samo estas pri **fiksa** kaj **fiksi**, **abstrakta** kaj **abstrakti**, **buko** kaj **buki**, **konfuza** kaj **konfuzi**, **korko** kaj **korki**, **loko** kaj **loki**, **regulo** kaj **reguli** ktp.

Alia formo de la matematika kaj Idista maltrafa rezonmaniero estas la konfuzo inter la komuna kaj la teknika lingvo, aŭ, pli ĝuste, inter la bezonoj de la komuna kaj tiuj de la teknika lingvo. Certo estas, ke oni ne povas difini fiksjajn limojn inter ambaŭ, tute same, kiel oni ne povas precize distingi kaj difini, kie finiĝas la blondeco kaj komenciĝas la bruneco. Tamen certe estas, ke ekzistas vere kaj pure blondaj haroj kaj ankaŭ vere kaj pure brunaj haroj, sed la mezkoloraj estas nedistingeblaj. Tiamaniere oni ofte ne povas decidi, ĉu iu vorto apartenas al komuna aŭ al faka lingvo, ĉar tio dependas de la stato kaj disvastiĝo de la sciencaj konoj, kaj de la inteligento kaj klereco de tiu, kiu uzas la lingvon. La grado de vortoj **telefono** kaj **aeroplano** iam certe apartenis al la teknika lingvo; kiu tamen kuraĝus hodiaŭ aserti, ke ili ne estas komunlingvaj?

La vera diferenco inter la teknika kaj la komuna lingvo ne kuŝas en la vortoj, kiujn ili uzas; ĝi kuŝas en la malsameco de iliaj bezonoj kaj praktikaj postuloj. Tute prave diras Prof. Aymonier „Neniu dubas, ke la scienca kaj teknika lingvo, en kiu la precizeco neniam povas esti tro granda, postulas pli multajn sufiksojn ol la komuna lingvo, pli severan uzadon de tiuj sufiksoj, pli rigidajn kaj pli mallarĝajn regulojn pri la vortkonstruo” La faka lingvo nepre bezonas absolutan precizecon, logikecon, unuformecon kaj neflekseblecon. Ekzemple ĝi estas tute prava preciziganta: kaj plimallarĝiganta la signifon de la sendifina sufikso UM; sed tia plimallarĝigo kaj precizigo estas nepre malprava, kontraŭfundamenta, danĝera kaj malpermesata, se oni pretendas, kiel faras nun kelkaj Esperantistoj, trudi ĝin al la komuna lingvo.

Ni ne imitu la Idistojn, kiuj erare konfuzas la bezonojn kaj postulojn de la scienca lingvo kun tiuj de la komuna lingvo. Koncerne la efektivajn bezonojn de la komuna lingvo, ni neniam forgesu la saĝajn kaj profundajn konsilojn de Zamenhof: „Lingvo absolute logika kaj tute sen idiotismoj estus lingvo senviva kaj

tro peza, ... Ni ne devas peni, ke nia lingvo estu tro preciza, ĉar tiam ni nin mem katenus. ... Tro granda severecco kaj katenado estas superflua. En tiaj okazoj, kie kelka libereco alportas al ni nenian malutilon, kial ni devus senbezone nin malliberigi? ... Ju malpli ni okupos niajn kapojn per diversaj 'plibonigoj' kaj ju pli ni simple propagandos kaj riĉigos la lingvon, des pli bone estos".

(*El Esperanto Triumfonta.*)

*Prof. E. Grosjean-Maupin.*

---

## La Papilio.

El la germana lingvo tradukis  
jur. Dolf Halbedl.

---

Bela ora papilio ŝvebadis inter ĉielo kaj tero. Super si ĝi vidis la ĉielan bluan, sub si la vastan florolandon, el kiu la oferoodoro suprenfluegis. Ĝi sentis tiom da agrablo, da feliĉego; ĝi deziris nenion krom flugi kaj ĉiam flugi. Kion ĝi kiel raŭpo ne volis kredi, pri kio ĝi sonĝis en sia malgranda ĉerko, ĉi ĉio nun estiĝis veraĵo.

Ĝi flugis pli alten kaj pli alten. Ĝi estis trinkinta la mielon de violo, de lilio kaj de rozo; nun ĝi deziris supren al la suno. „Al vi, vi ora floro de l'ĉielo, mi volas pendi, enspiri vian odoron, trinki vian mielon!" Tiel ĝojegis ĝia koro. Sed ju pli alten ĝi venis, des pli malpeza kaj maldensa estiĝis la aero, des pli malfacila sia flugado. Nuboj kunĉirigis iom post iom, ventoj ekblovis.

Jen ĝi ektimis kaj malsuprenigis sin.

Sed ankoraŭ la tero kuŝis profunde sub ĝi. Jen ventego kaptis kaj tiregis ĝin en nubon de fulmotondro. Terure malheliĝis ĉirkaŭ ĝi, fortege ĝi estis forpelata, ĝiaj delikataj flugiloj venis en danĝeron rompiĝi. Subite ĝi trovis sin meze de ruĝa fajro; sed tiu ne forbruligis, sed nur blindigis ĝin. Senpere poste ekestis terura bruego — estis kvazaŭ la vastega ĉielo bruege enfalus kaj la tero estus frakasata per la falego. Blindigite kaj surdigite ĝi ne plu kapablis movi siajn flugilojn; kiel malpeza folio de arbo ĝi portiĝis per la ventego. Profunde sub si ĝi ekaŭdis obtuzan muĝadon.

Kelkan tempon la fulmotondro furiozis; poste ĝia furiozado malfortiĝis, fulmis malpli ofte, malpli laŭte ruladis la tondro. La papileo sur la flugiloj de l' ventego ege estis antaŭenrapidinta la fulmontondron. Fine ankaŭ la ventego mildiĝis, la papilio reakiris konscion kaj forton. Arde trempis sin en la maron la suno, la koloraj rubandoj de ĝia vestaĵo el lumo ankoraŭfoje flagris vasten trans la ĉielo — poste ĝi malaperis.

Malheliĝis kaj la papilio ne jam atingis la teron. Jen, sub si ĝi vidis milojn da lumoj brili kaj brilegi. Ĉu estis lampiroj, kiuj ĉirkaŭsaltetis la gutantajn arbustojn? La fajroj brulis ruĝete kaj malhele — lampiroj ne povis esti. Fine ĝi sentis sub siaj piedaj ion firman. Ĝi faldis la flugilojn kaj tuj ekdormis pro laciĝo.

Kiam ĝi vekigis la alian matenon, ĝi sin trovis sur tegmento de domo. Mirigite ĝi ĉirkaŭrigardis kaj pripensis, kiumaniere ĝi venis ĉi tien. Baldaŭ ĝi rememoris pri ĉio. Kaj jen! Kiom vasten rigardis ĝia okulo, ĝi nenion vidis krom senfinan domaron. Miloj da niĝretaj kamentuboj ĉie suprenstaris, malpura aero vaporis supren el la strataj kaj sterniĝis kiel griza kovraĵo, kiu malheliĝis la ĉielon. Ĝi vidis neniun arbon, neniun arbeton; ĝi vidis nek herbejon, nek arbaron, nek riveron. Veo kaj timo ekestis en ĝia koro. Ĝi memoris sian hejmuĵan arbaron kaj ekflugis, unue por ree veni en liberon. Sed, super kiom ajn da tegmentoj ĝi flugis — ĉiam pliaj rigide renkontrigardis ĝin. Fine ĝi ekvidis liberan placon, sur kiu staris floroj vendotaj. Ĉar preskaŭ konsumiĝinte, ĝi flugis malsupren por refreŝiĝi per la mielo de floro. Sed iu knabo celante ĝin, batis per sia bastono kaj apenaŭ ĝi forglitis de la morto. Nun ĝi flugis laŭ-longe de longa strato. Jen ĝi vidis grandan florgarbon antaŭ fenestro de domo. Ĝi eksidis sur floro, sed trafis ĝin malagrabra lakodoro — ĝi sidis sur pentrita elpendaĵo.

Ĉe domo fenestro estis malferma, florvazo staris sur la breto. Tien la papilio tuj flugrapidis; sed ĝi trovis nur foliojn kaj ne ununuran floron, el kiu ĝi povus trinketi guteton da mielo. Ĝi ĉirkaŭrigardis en la ĉambro. Sur muro pendis vitra kesto, en kiu estis tutaj vicoj da papilioj. Tre ĝojigite ĝi sidigis sin sur la vitrokesto por paroli kun siaj fratoj kaj demandi ilian konsilon. Sed kiel ĝi ekstremis, vidante, ke ĉiuj ili estis trapikitaj, ke ili estis mortaj kaj sekiĝintaj.

Per laca movado de l' flugiloj ĝi forlasis la ĉambron kaj flugetis pluen laŭ la senfina strato. Jen ĝi rimarkis kastelon, sur kiu briladis kvar grandaj oraj globoj. Ĝi rigardis ilin kiel florojn kaj eksidis sur unu el ili. Sed la brilanta metalo estis malvarma kaj ankaŭ tie ĝi ne spertis refreŝiĝon. En la korton de l' kastelo veturis kaleŝo. Juna fraŭlino venis el la pordego kaj eniris la fiakron. Ĝi portis subtilelegantan ĉapelon, kiu paradis per ĉarmeĝa florornamaĵo. Ĉion ĉi vidis la papilio sur sia alta sidejo. Rapide ĝi ŝvebis malsupren kaj eksidis sur unu el la floroj, kiuj ornamis la ĉapelon. Bonodoro prezentis sin al ĝi kaj ĝoje ĝi enklinis sin en la kalikon de floro. Sed ankaŭ ĉi tie ĝi ne trovis mielon, ĉar la floro estis artifa, farita de homaj manoj, en kiun antaŭ kelkaj tagoj la fraŭlino gutigis guton de rozoleo. La kaleŝo forveturis.

Senkonsole la papilio ekflugis kaj plu vagadis en la urbo. Sufiĉa tempo pasis. Plurfoje ĝi estis en danĝero-kaptiĝi, kiam, por iom

riposi, ĝi sidiĝis sur ŝtono, elpendaĵo aŭ duono de malfermita kelerpordo. Fine, iĝante ĉiam pli malhelega, venis la nokto de l' plej mizera kaj malgaja tago de ĝia vivo, kaj ankoraŭ ĝi estis en la urbo. Ĝi sidis sur blanka kurteno de ĉambro, kies fenestroj estis malfermaj. Tien ĝi rifuĝis antaŭ granda vesperto, kiu jam tre frue elflugis el sia kaŝejo. En la ĉambro staris ĉerko, en kio kuŝis juna pala knabinjo. Ŝi aspektis tiel bela kiel marmora figuro; la okuloj estis fermitaj, blanka vertaĵo ĉirkaŭkovris la delikatan korpon. Sur apuda tablo, antaŭ krucifikso, malhele brulis lampo.

Baldaŭ la papilio ekdormis pro laciĝo.

La alian matenon homaj voĉoj vekis ĝin. Nigre vestita sinjorino klinis sin super la mortinta infano. Ŝi vokis ŝin per la nomo kaj varmegaj ŝiaj larmaj falis sur la palan belan vizaĝon. Du viroj, (la avo kaj patro de l' infano), kies okuloj ankaŭ naĝis en larmoj — fine forkondukis la senkonsolan patrinon. Jen la papilio ekvidis bukedon, kiun la patrino donis al la infano en la manojn, el kiu vidiĝis kruceto, formita el vakso.

Rapide ĝi alflugis — estas naturaj floroj. Floroj plenaj deodoro kaj mielo, kiujn la infaneto devis kunpreni en la profundan tombon. Ebria pro ĝojego la papilio klinis sin en unu de la floroj, refreŝigis sin per la bongusta mielo kaj ne rimarkis, ke intertempe pluraj viroj alpaŝis kaj metis la fermilon sur la ĉerkon. Obtuzaj martelobatoj ekbruis, la papilio ekflugis — sed ĉio estis malluma. Per la ĝemado de l' patrino ĝi sciigis, ke la tero akceptos la infanon, ke estis elfosita profundega tombo. Timo frostremigis ĝin. Ĝi sentis, kiel la ĉerko estis levata kaj forportata. „Ve al mi“, ĝi kriis, „do mi mortu mizere en la mulluma tero!“ Sed baldaŭ ĝi ekmemoris, ke ja ĝi mem ankaŭ kuŝis en ĉerko, en la kokono, „O!“ ĝi pensis, „ĉu la ĉiopotenca Kreinto, kiu vekis min, ne elvokos el ŝia malhela domo ankaŭ la infanon?“

Konsolo kaj espero ĉe tiu demando venis en ĝian koron. „Mi volas resti ĉe la infano“, ĝi pensis, „volas refreŝiĝi per la floroj, kiujn ŝi portas (kun la kruceto) en la manoj kaj poste releviĝi kun ŝi! Antaŭe mi estis malbela je figuro; kaj kiam mi leviĝis el la diskrevigita kokono, mia ĉerko, la viviga Kreinto ornamis min per mirindaj ĉarmo kaj kolorbelegeco kaj ŝvebigiloj kaj provizis min per novaj mirindaj fortoj. Mi, kiu kiel raŭpo nur rampis, povas nun, disrompinte la kokonon, ĝaje ekfluĝi, flugi de floro al floro, kaj plej dolĉa mielo de tiam estis mia manĝaĵo. — Tio okazis al mi, papilio, kaj la knabinjo devus resti en la ĉerko por ĉiam? — O certe! Ŝi kiu estis tiel bela kaj pura jam surtere, kiel lumfiguro suprenŝvebos kaj tiam, ripozante en unu el ŝiaj floroj, mi volas portiĝi de ŝi al la suno, al kiu veni vane mi aspiris! Do, metu nin nur en la tombon: baldaŭ la mallonga nokto estos pasinta!“

Tiel la papilio konsolis sin. Ĝi ne sciis, ke semajnojn ĝi dormetis en sia malgranda ĉerko, sed opiniis, la dolĉa, songoplana dormo daŭris nur mallongan somernokton. Tiel laŭ ĝia espero, okazos ankaŭ al la kadavro de l' knabino.

Nun eksonis funebra kanto; la portistoj ekhaltis kaj la ĉerko estis metata sur la teron. Poste la papilio aŭdis mildan voĉon preĝi kaj konsoli la funebrantan patrinon kaj klare ĝi aŭdis la pastro-parolon de l' dia Savinto: „Mi estas la revivigo kaj la vivo; kiu kredas min, vivos eterne!“ Sed laŭta plorado, ekkrioj de plej profunda doloro — tio estis la respondo de la patrino. Ŝi jetis sin super la ĉerkon kaj ne volis lasi enterigi ĝin. Kun plorantaj okulaj parencoj kaj amikoj de ŝia familio alpaŝis kaj provis trankviligi la ege punitan patrinon, kies sola kara infano estas vokita en la ĉielan hejmujon. Ĉiuj vortoj de konsolo komence ŝajnis vanaj, sed fine la plorantino ĝemis kredeme kaj humile: „Sinjoro, plenumiĝu Via volo!“ — Ŝi postulis nur: ankoraŭ unu fojon premi ŝiajn manetojn, per kiuj ŝi tenis la krucifikseton, kaj ankoraŭ unu fojon kisi ŝiajn palajn lipojn. La ĉerko estis malfermata.

Jen, timigite per la ekvido de l' homoj, kiuj staris apud la ĉerko tiom proksime, la ora papilio ekflugis, flugis rapide supren kaj malaperis malantaŭ la proksimaj arboj altaj. Sidante sur larĝa folio li povis nevidate de la homoj, superrigardj la lokon de malĝojo. Ĉiuj funebrantoj vidis ĝin suprenflugi. La patrino surgeniĝis kaj rigardis ĉielen kun atenditaj brakoj. Radio de dia paco briletis sur ŝia ankoraŭ larmoplana vizaĝo. Al ŝi estis, kvazaŭ patra favoro de Dio per la prsuenfluginta papilio donis videblan signon, ke ŝia infano rekontiris al pli bela vivo. Poste ŝi kisis ankoraŭfoje la palajn lipojn, same la vaksan kruceton en la bukedo en la blankaj manoj, faris krucosignon super la kadavro kaj apergis ĝin per sanktakvo — poste ŝi faris signon al la portistoj kaj dum plena silento la ĉerko estis fermata kaj metata en la tombon. Senvoĉe kaj kun preĝopozaj manoj ŝi staris apud la tombo. La pala vizaĝo ŝajnis esti ĉiele suprervertata de la glorigo de l' paskespero.

---

## Korektotaj en EK. 127.

p. 167, 10 lin. de mals.: ankoraŭ, d. e. ankaŭ.

p. 176, *Ex corde benedicente*. d. e. *benedicens*.

p. 187, 8 l. de mals.: fluguloj, d. e. flugiloj.

p. 188, 10 l. de mals.: nur d. e. nun.

p. 198: Gaje ĝin alridas, d. e. salutas.

---

Nihil obstat.

A. J. G. VERSCHURE, Cens  
Tilburg, 6 Majo 1922.

---

Evulgetur.

J. POMPEN, Vic. Gen.  
Buscoduci, 6 Majo 1922